

& 1905:

< Rekante 20 el 43 batoj por strofo, entute 369 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Nikolao Hohlov (La tajdo, 1928). Baladigis Martin Strid (2016) per rusa melodio modifita kaj nova rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:43> (

/MiMi MiiMiMi do MiMi FaRe e; ReRe ReeReRe Fa MiRe DoDo; FaFa FaaFaFa Mi ReTI ReDo o; LaLa LaaLaLa La SiLa TiTi

(#Rekantaĵo: i;Mi dodo dodo do Ti rere doTi Ti La; La LaLa Sodo mimi rere mifa mi; dolLa MiMi Tido La a)

)×9)+

(& Strofoj:

'1 /Mi memoras: fenestroj flamantaj ;
Sub la suno subira sangadis, ; Kaj la
stratoj, ebriaj pro kantoj, ; Al la ruĝa
liber' serenadis.

(×: **Nin ligas kuna koro kaj pasia
amo ; Mi ne kapblas ĝin forlasi pro
perfid' ; Ni2n ligas kuna kor'.**)

'2 Iu forta la brakojn muskolajn ;
Disetendis por fojo unua ; Kaj elĵetis
malnovajn idolojn ; El la templo per
bato forskua.

'3 Flirtis gaje skarлатаj rubandoj, ; Oron
semis la suno vespera, ; Kaj respondis
al ĉies demandoj ; Juna voĉo: libero,
libero!

'4 Sed ekkrakis la pafoj – de kie? – ;
Ekbruegis eksplodoj tertremaj, ; Kaj
kun fajfoj de l' kugloj, orgie, ; Ĉien
flugis malbenoj kaj ĝemoj.

'5 Freneziĝe, la homoj sin ĵetis ; Post la
niĉojn, al strataj anguloj, ; Puŝis en la
tumulto, faletis, ; Kun teruro en larĝaj
okuloj.

'6 Sub la boro de l' plumbaj hajleroj ;
Multaj falis kun raŭka stertoro – ;
Nekonataj, sennomaj oferoj ; Al la
blinda, despota teroro.

'7 Per fluetoj la sango martira ;
Kolorigis la ŝtonojn pavimajn ; Dum
viciĝis en kurba spaliro ; Bajonetoj,
serĉantaj viktimojn.

'8 Kaj okazis la murdo plej brutaj ; La
vunditojn trapikis la ŝtalo, ; Kaj post
unu freneza minuto ; Venis kruda,
ĉesiga finalo.

'9 Kaj ankoraŭ post unu momento ;
Ĉion regis kadavra silento, ; Nur ŝiritan
kantadon kun pento ; Ĉiam portis de ie
la vento.)